nia voĉo

madrida esperanto-liceo julio/aŭgusto 2013

## SAT-KONGRESO EN MADRIDO

La 28an de julio komenciĝos en Madrido la Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda, unuafoje en la historio en nia urbo.

SAT estas unu el la plej gravaj esperantistaj asocioj en la mondo, fondita en 1921 por kunigi laboristajn aktivulojn diverstendencajn. Ĝia nomo aludas al la fakto ke ĝi ne estas organizita laŭ landoj aŭ nacioj, sed celas superi tiujn dividojn. SAT posedas elstaran historion, dum periodoj eĉ konkurantan kun la ĉefaj neŭtralaj organizoj. Ĝia kultura agado elstarigindas, kun aparta rimarko al ĝia eldona agado, inter kiuj nepras mencii la publikigadon de la ĉefa esperanta vortaro, la PIV.




La kongresejo estas studenta restadejo, “Colegio Mayor Universitario Chaminade”. La organizantoj estas la asocio SAT-en-Hispanio, ligita al SAT. Ĝi jam anoncis la programon kaj la ĉefajn aktivaĵojn. Dum la matenoj koncentriĝos kunvenoj kaj debatoj, rilataj al la esperanta kaj laborista agado, propra al SAT. La kulturaj kaj distraj programeroj okazos plejparte vespere.

Inter la multaj prelegoj,menciindas tiu de Miguel Fernández pri “Kontestema, engaĝiĝinta, socia kaj revolucia poezio”, kadre de prezento de la libro “Poezio: armilo ŝargita per futuro”, antologio de poeziaĵoj tradukitaj el plej gravaj verkistoj hispanlingvaj.

Indas mencii ankaŭ du prelegojn de invititaj pensuloj, Félix Rodrigo Mora pri “Sociaj movadoj: evoluo kaj perspektivoj. Vojo al la Integra Revolucio” kaj de Prado Esteban pri “Virinoj kaj Revolucio”.

Debato (hispanlingve, kun samtempa tradukado) pri “Esperanto ekster Esperantujo. Simpatio al Esperanto ĉe alternativaj komunikiloj” okazos kun partopreno de gazetoj “Tierra y Libertad”, “Germinal”, "CNT", "Estudios", kaj internacia traduk-reto Tlaxcala.

Lerno-rondoj okazos gvidataj de Manuel Pancorbo pri “Peĉakuĉo” (serio de mallongaj prelegetoj pri diversaj temoj), de Jorge Camacho pri poezio kaj pri gazetfarado, de Miguel G. Adúriz pri “Filmetoj – Jutubo”, de Pierre Soubourou “Ŝtonĉjo” pri “Pretigo de prelego” kaj de Brandon Sowers pri “Trejnado de laboristaj organizantoj surbaze de la sperto de IWW”.

Oni projektas fari omaĝon al la teatro, gvidotan de nia licea kolego la poeto Miguel Fernández, kaj oni oficiale prezentos la filmon “Esperanto” de Dominique Gautier.

Ne mankos vizita kaj turisma programo. Tuttaga ekskurso estas organizita al Toledo la 1-an de aŭgusto, kun promenado tra la urbo kaj speciala vizito al la plej gravaj muzeoj kaj monumentoj. Ĉio en Esperanto kaj je tre malalta prezo por kongresanoj. Postkongresaj ekskursoj estas programitaj al la nordo de la madrida regiono, por viziti la mezepokajn vivstilojn (5-a de aŭgusto), kaj al la proksimaj Segovio (6-a) kaj Avilo (7-a).

La kongreso estos granda ŝanco por akiri librojn kaj aliajn materialojn, ĉar kuniĝos du grandaj esperantaj Libroservoj, tiu de SAT-en-Hispanio kaj tiu de SAT-Amikaro de Francio.

Ekspozicio hispanlingva pri Esperanto estos vizitebla dum la kongreso. Ankaŭ por neesperantistoj estas programita prelego kaj kurso, interalie.

Oni povas trovi pli ampleksan kaj detalan informaron pri la kongreso (aliĝiloj, listo de aliĝintoj, loĝejo, kiel alveni, fotoj ktp.) en la oficiala retejo http://satesperanto.org/-2013-86-madrido-.html

## VALENCIA RENKONTIĜO

La Valencia Esperanto-Renkontiĝo okazis en Olivo kun partopreno de kvardeko da samideanoj, inter kiuj 4 el madrida regiono. Dum ĝi oni transdonis faskon da libroj donacitaj de Madrida Esperanto-Liceo por la loka biblioteko.

## UNIVERSALA KONGRESO EN REJKJAVIKO




Mil kongresanoj el 55 landoj aliĝis al la 98-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos en la islanda ĉefurbo Rejkjaviko de la 20-a ĝis la 27-a de julio.

Kvankam la 98-a UK okazos en Eŭropo, plej multe da kongresanoj liveris tamen Japanio, kiu kun 97 aliĝintoj ĝis nun ankoraŭ povos superi 100, verŝajne kiel la sola lando. Sur la dua loko estas Francio (88) kaj sur la tria Germanio (83). Alte, kiel la kvara, en la statistiko staras Ĉinio kun 59 aliĝoj.

El Hispanio ĝis nun aliĝis 16 homoj.

## VIZITIS KAJ VIZITOS NIN

Dum la kutima babilrondo de la unua sabato de la monato, kiu okazos la 6-an de julio, je la 17,30 en la Kuboplaco, partoprenos la belga samideano Heidi Goes. Ŝi povos rakonti multajn aferojn pri sia laboro por Esperanto en Indonezio.

Pedro Albeirice, universitata profesoro el Brazilo pri Beletra Tradukado kaj ankaŭ Brazila Literaturo, kiu ĉi-jare laboras en Malto kiel Vizitanta Profesoro kaj postdoktoriĝas pri tradukado de la portugala en la hispanan, vojaĝos al Hispanio dum julio. Li celas plibonigi sian komprenon de la hispana lingvo kaj ankaŭ pretas prelegi esperante en universitatoj, mez-lernejoj kaj Esperanto-societoj ie ajn en Hispanio. Li venos al Madrido fine de julio.

Esperantisto el Germanio, Diana, vojaĝis Madridon komence de junio kaj vizitis la oficejon la lundon 10-an. Ŝi estas unu el la kunlaborantoj de la video-kurso "Pasporto al la Tuta Modo".

## EKSPOZICIO EN USERA

Dum la tuta monato julio videblos la paneloj pri Esperanto en ekspozicio en la Publika Biblioteko "José Hierro" de la kvartalo Usera, en Av. Rafaela Ybarra, 43.

## HELPO AL ORFEJO DE KONGO

Memoru ke nia samideano Pedro Hernández peras helpkontribuojn por orfejo en urbo Goma, Kongolando, estrata de esperantistoj. Kontribuu al la konto ĉe Triodos Bank: 1491 0001 22 2042949723.

## VENONTAJ RENKONTOJ

Dum julio kaj aŭgusto la lundaj kunvenoj de MEL okazos nur sporade. Se vi intencas veni, unue certiĝu ke oni malfermos la ejon.

Novaĵoj kaj detaloj aperas en retlisto http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/ kaj en retejo http://www.esperanto.es/mel.

Nia Bulteno ne aperos en aŭgusto. **Feliĉan feriadon al ĉiuj!**

madrida esperanto-liceo

San Alejandro 6-4ºB-ext. 28005 Madrid (nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7, Madrid

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com